# Kompletigu la tekston per la ĝustaj posedaj pronomoj aŭ / kaj rilatiga vorto!

La situacio:
La gepatroj estas Maria kaj Jozefo, la gefiloj Tomaso, Ede kaj Eva.
La najbaraj infanoj Judit kaj Bodo.
Ede amas Judit, sed Eva ne amas ŝin.
Bodo amas Eva, sed ne ŝatas Tomason.

***a. Maria atendas la infanojn antaŭ la lernejo.***

Maria atendas ....... gefilojn kaj ...... geamikojn.

***b. Unue venas Ede, Eva kaj Judit.***

Eva venas kun ...... frato kaj ....... amikino.

Ede venas kun .......fratino kaj ....... amikino.

Judit venas kun ........ amiko kaj ....... fratino.

***c. Tomas kaj Bodo malfruis.***

Tomas kaj Bodo pardonpetis pro ....... malfruo.

Maria koleris pro ....... malfruo.

Eva demandis ....... fraton kaj ........ amikon pri ....... malfruo.

***ĉ. Judit kaj Bodo estas ĉe la najbaroj.***

Maria kaj Jozefo vespermanĝas kun ....... gefiloj kaj ........ geamikoj.

Bodo konversacias kun ..... amikino kaj ...... patro, sed ne parolas kun ...... filo.

La patrino petis ..... edzon por ke li helpu al ....... gefiloj interpaciĝi kun ........ samlernejanoj.

# SOLVOJ

***a. Maria atendas la infanojn antaŭ la lernejo.***

Maria atendas **siajn** gefilojn kaj **iliajn/ties** geamikojn.

***b. Unue venas Ede, Eva kaj Judit.***

Eva venas kun **sia** frato kaj **lia** amikino.

Ede venas kun **sia** fratino kaj .**sia** amikino.

Judit venas kun **sia** amiko kaj **lia/ties** fratino.

***c. Tomas kaj Bodo malfruis.***

Tomas kaj Bodo pardonpetis pro **sia** malfruo.

Maria koleris pro **ilia** malfruo.

Eva demandis **sian** fraton kaj **sian** amikon pri **ilia/ties** malfruo.

***ĉ. Judit kaj Bodo estas ĉe la najbaroj.***

Maria kaj Jozefo vespermanĝas kun **siaj** gefiloj kaj **ties** / **iliaj** geamikoj.

Bodo konversacias kun **sia** amikino kaj **ŝia** patro, sed ne parolas kun **ties/lia** filo.

La patrino petis **sian** edzon por ke li helpu al **siaj** gefiloj interpaciĝi kun **siaj** samlernejanoj.